# komunikoj

JARO 37-a | JANUARO - FEBRUARO - MARTO | N-ro 145 2012


"Amu vian Dion
per via tuta animo
kaj vian proksimulon
kiel vin mem."
Jesuo

**Naskiĝi, morti, renaskiĝi ankoraŭ kaj ĉiam progresi tia estas la leĝo.**

## BELAJ KAJ AGRABLAJ MOMENTOJ!



La festo pri la 36ª datreveno de Lorenz estis tre agrabla: Neide Barros Rêgo deklamis, kantis kaj lumigis la etoson de la kunsido. Ismael Miranda e Silva, elegante, prelegis pri "La Diskonigo de Spiritismo pere de Esperanto", precipe en la Universalaj Kongresoj de Esperanto. La Koruso de la Centro de Kunvivado de Maljunuloj Sindona Amikaro prezentis belajn muzikojn kaj la publiko aplaŭdegis. La Lorenza Estraro omaĝis tri gesamideanojn pro la longa apogo al nia Eldonejo, nome: Suely Lopes, Zita Flora de Almeida kaj Ismael Miranda e Silva. Post la paroladoj, omaĝoj, kantoj kaj aliaj eroj de la programo, la Estaro de Lorenz invitis ĉiujn por bongusta kaj tradicia lunĉo, kompreneble!



## BKE, BRES kaj DOMO DE LA VOJO

Lorenzanoj vigle partoprenis, en la urbo Taguatinga, la 47-an Brazilan Kongreson de Esperanto. Pli ol 60 homoj ĉeestis la kunsidon de Lorenz por aŭdi la prelegon de Elmir dos Santos Lima pri "Materia Karitato kaj Morala Karitato". Aliaj tre interesaj momentoj de Lorenz estis nia ĉiam tre alloga budo; la prelego de Robinson kaj Passini ĉe Spiritisma Centro Domo de la Vojo, kaj la partopreno ĉe la Brazila Renkontiĝo de Esperantistoj Spiritistoj.

**Do, nun estas atendi la Hanojan Kongreson kaj tie denove la teamo de Lorenz, ĝoje, semi kaj semi.**

# Speciala Kajero



Zita Flora parolas



Ismael Miranda prelegas



Omaĝo al s-ino Suely Lopes



Teatraĵo



Neide kantas



Koruso de maljunuloj

*La Estraro de Lorenz dankas al ĉiuj kunlaborantoj, amikoj kaj samideanoj, ke dum tiel longa periodo vere subtenis nian Eldonejon. Dio benu vin ĉiujn!*

*"Vivu, kresku kaj floru la verda standardo."*
*L. L. Zamenhof*



## KURIOZAĴOJ EL LA LETEROJ DE ZAMENHOF

**1889**
**Al multaj demandantoj**

Kelkaj ne antaŭviditaj cirkonstancoj malrapidigis la eldonadon de la "Kolekto" kaj "Adresaro". Nun la 1ª kajero de la "Kolekto" estas jam preta, kaj la 1ª kajero de la "Adresaro" estos preta espereble tre baldaŭ.

*Z.f.*

**1889**
**Al s-ro J.R. kaj aliaj amikoj en Svedujo (o.v. II-5)**


De kelkaj flankoj Viaj proponoj estas tre bonaj. En la alfabeto efektive estus utile fari ian ŝanĝon; sed restas la demando. Kiel ĝin fari kaj kiu devas kaj povas ĝin fari? Multaj ŝanĝoj estas proponataj al la aŭtoro de ĉiu flanko, ĉiu proponas laŭ sia bontrovo; sed se la aŭtoro volus ĉiutage ŝanĝi la lingvon, tiam la tuta afero ja nenion taŭgos. La aŭtoro ne havas jam la privilegion fari ŝanĝojn laŭ sia opinio, kaj aŭtoritata kompetenta akademio ankoraŭ ne ekzsitas. Nun kio restas fari? La respondo estas: 1) la ŝanĝojn, kiujn Vi proponas, skribu en formo de artikoleto, montrante klare la vojon, per kiuj la ŝanĝoj povas esti farataj, kaj tiun ĉi artikolon ni penos presi en la "Esperantisto", por ke ĉiuj amikoj povu ĝin pripensi kaj prilabori, tiam estos teorie decidita ĉu Viaj proponoj estas bonaj; 2) helpu aŭ montru la vojon por baldaŭa fondiĝo de aŭtoritata akademio, - kaj tiam Viaj proponoj ankaŭ praktike povas baldaŭ esti deciditaj, - Ne sufiĉe estas stari sur la flanko kaj montri malbonaĵo sen danĝero por la afero mem estu baldaŭ anstataŭita per plibonaĵo.

*Z.f.*

**1889**
**Al s-ro G. en Varsovio**

Ankaŭ al Vi mi varmege rekomendas la "vortareton kun la antaŭparolo". Nia plej grava laboro devas esti ĉiam pligrandigadi la nombron de la personoj, kiuj ellernis nian lingvon; ĉia alia laboro estas flanka. Antaŭ ĉio ni devas penadi, ke nia afero stariĝu sur fortaj piedoj en la mondo; ĉio alia venos per si Mem.

*Z. f.*



## KURIOZAĴOJ EL LA LETEROJ DE F. V. LORENZ

**Al srº Ismael Gomes Braga, RIO.**

S. Feliciano, RG Sul, la 17an de Majo 1942.

Tre estimata Amiko kaj Samideano:

Korajn salutojn al Vi kaj al Via ŝatinda Familio.

La antaŭhieraŭa poŝtalveno alportis al mi Vian afablan leteron el la 25ª de Aprilo, kune kun la paĝoj 46-63 de Via traduko de la Libro de la Spiritoj. Kiel mi sciigis Vin je la 10/5, mi komencis la tradukon, kvankam nur malrapide faratan. Antaŭ la alveno de la lasta poŝto, mi tradukis iom kaj ĉikune mi ĝin sendas. Vidante ke Vi jam estis tradukinta tiujn samajn paĝojn, mi nun ĉesos, por ne fari ni du unu saman laboron. Via tradukado estas bonega, kiel mi jam skribis al Vi. En la partoj, kiujn ankaŭ mi faris, Vi povas kompari kaj elekti en iuj lokoj tiujn vortojn, kiujn Vi preferas. Mi estis timanta uzi la vorton "verko" pri la Diaj agoj, ĉar la Universala Vortaro de Zamenhof indikas tiun vorton nur pri literatura laboro; tamen, en la Plena V. mi trovis nun ke ĝi ankaŭ povas esti uzata en alia senco. Kie mi korektis la frazojn, kiel "Estas tiel ke...", mi ĝin faris por eviti portugalismon. Mi uzis la vorton "infinito", ĉar la plena vortaro enhavas ĝin; sed mi agnoskas ke eble estos pli bone diri, kiel Vi diras, "senfino". (Eble tamen "infinito" estas pli logika, ĉar ĝi signifas ankaŭ senkomenco.)

Nun mi ne daŭrigos mian tradukadon, sen havi Vian respondon je jena demando: Ĉu Vi volos traduki iujn partojn, kaj lasi por mi aliajn? Mi ne kredas ke Vi "ne lernis" Espºn, kaj ke Vi dubas pri ĝia venko. Se mi tion dirus, estus kredeble; ĉar mi estis dubinta. Sed nun mi ne pensas ĉu jes, ĉu ne... ĉar la laboro plaĉas al mi. Bedaŭrinde, la aĝo malhelpas min. Al reskribo!

Frate Via,

*F.V.L*



# EMMANUEL RESPONDAS

En kunsido okazinta la 31-an de oktobro de 1939, ĉe la Spiritisma Grupo “Luis Gonzaga”, en la urbeto Pedro Leopoldo, Brazilo, amiko el la spirita sfero sugestis al ĝiaj membroj diskuton de doktrinaj temoj, per demandoj farotaj al la Spirito Emmanuel, por pliigi la sferon de niaj scioj. Tiel, per la mediumeco de Francisco Cândido Xavier, la Spirito Emmanuel respondis 411 demandojn el la plej diversaj temoj: scienco, kemio, fiziko, biologio, psikologio, filozofio, sociologio, evangelio, religioj, mediumeco, frateco, pardono, doloro, kulturo, arto kaj multaj aliaj temoj stimulas nin al studado de tiu bela verko!

**Ĉu la virto estas donitaĵo de Dio aŭ akiraĵo de la homo?**

La doloro, la lukto kaj la sperto estas ia sankta okazo donita de Dio al siaj kreitaĵoj en ĉiuj tempoj. Sed la virto ĉiam estas sublima, senmorta akiraĵo de la spirito sur la vivovojo, akiraĵo poreterne kuniĝinta al niaj valoroj, konkeritaj per lia propra diligenta laboro.

**Kial Jesuo konsilis pardoni “sepdekoble sep fojoj”?**


La Tero estas sfero de spertoj kaj elpagoj kelkfoje tre penigaj, kaj, kiu sin sentas ofendita de iu, tiu ne forgesu, ke ankaŭ li mem povas erari sepdekoble sep fojojn.

**Ĉu la respondo de Jesuo al liaj disĉipuloj: “Kiu estas mia patrino? Kaj kiuj estas miaj fratoj?” estas ja ia instigo al la tutmonda frateco?**

La Sinjoro aludis la malfirmecon de la sangaj ligiloj, starigante la amoformulon, kiu ne devas esti limigita al la intima médio, sed ligita al la tutmonda médio, sur kies vojoj ni nepre devos frate priatenti kaj helpi ĉiujn bezonantojn, ekde la ŝajne plej feliĉaj ĝis la plej mizeraj.



Jen ege grava amiko de Lorenz, simpatia samideano kaj veterano ANTÔNIO DE PÁDUA SOARES. Li estas la ano numero 1 de nia Eldonejo. La Estaro tutkore vin dankas pro la konstanta apogo al NIA laboro!




La *Konsolanto* estas la senpaga libro de ĉi monato. Se niaj karaj ekster brazilaj samideanoj interesiĝos, petu kaj vi tuj ĝin ricevos. Ne preokupiĝu pri la sendkostoj, ĉar ilin pagos nia Eldonejo.
Petojn oni sendu al: editora_lorenz@uol.com.br

Vi estas mergita en la oceano de la Dia amo.
Neniam vi estas sola, Dio estas en vi kaj ĉirkaŭ vi.
Malkovru Lin kaj lasu, ke Li konduku vin saĝe.
Vi estas Lia heredanto, posedanto de la Universo.
Permesu ke Lia amo tute vin penetru, direktante vian volon kaj viajn paŝojn, ebligante al vi kreski kun malpli aŭ neniom da sufero.
En Dio vi ĉion trovas, tute plenigante vin per bonkvalitoj.

*Spirito: Joanna de Angelis*
*Mediumo: Divaldo Pereira Franco*

**JAM ESTAS TEMPO POR REALIĜI!!!**

Ne forgesu, kara ano, ke via jara kontribuo treege helpas nin eldoni spiritismajn verkojn en Esperanto kaj ilin sendi, tute senpage, al niaj eksterlandaj samideanoj. Kaj vi, kara amiko, kiu neniam aliĝis, petu informojn kaj, kun plezuro, ni vin sciigos pri la laboro de nia Eldonejo kaj kion vi, kiel ano, ricevos en la komforto de via hejmo. Dio benu vin!

**editora_lorenz@uol.com.br**
Tel. (21) **2221-2269**

LORENZ


**SPIRITISMA ELDONA ASOCIO F. V. LORENZ**

Rua Francisco Vale, 57, Engenheiro Leal
Rio de Janeiro CEP 21370-171

Tel. (21) **2221-2269** <editora_lorenz@uol.com.br>

“FELIĈAJ ESTAS VI, KIAM ONI VIN RIPROĈOS KAJ PERSEKUTOS KAJ FALSE VIN KALUMNIOS PRO MI”. (Jeuso)




"ĜOJU KAJ RAVIĜU, ĈAR VIA REKOMPENCO ESTOS GRANDA EN LA ĈIELO; ĈAR TIEL ONI PERSEKUTIS LA PROFETOJN, KIUJ ESTIS ANTAŬ VI". (Jesuo)